# Agado de nia Asocio


Ekde la publikigo de nia antaŭa A.E.A.-informilo, en kio koncernas al la agado de nia Astura Esperanto Asocio indas informi pri la jara Asembleo, kiu okazis la 30an de marto en nia tiama sidejo.

Post aprobi la akton de la antaŭa kunsido kaj la informon pri la agado de la Asocio, estis interkonsento pri la daŭrigado de la kutimaj taskoj de nia esperantista kolektivo: instruado pri la Internacia Lingvo, niaj publikigaĵoj ene kaj for de la (Inter)reto…

Cetere, estis neniu ŝanĝo en la kompono de la Asocia estraro.

En monato junio finiĝis la lerno-kurso 2006-2007. Kiel ni jam komunikis per la antaŭa numero de nia A.E.A.-informilo, post la gvidado de la unua trimonato de tiu kurso fare de Santiago Mulas, ĉi tiu suferis gravan akcidenton kiu malpermesis al li daŭrigi tiun taskon dum multaj monatoj, kaj dediĉiĝi al longdaŭra kuracado, ankoraŭ ne tute finita. Tial oni devis enkonduki ŝanĝojn por la du ceteraj trimonatoj de la kurso: Ĉiusemajne, unu tagon gvidis la klason Carlos E. Carleos, kaj la alian Faustino Castaño.

En la unua klaso de la semajno oni daŭrigis la lerno-planon tia kia ĝi estis antaŭe, sed en la dua estis iu novaĵo. Kiel ekzerco por praktikado de Esperanto-tradukado oni elektis hispanlinvan komikso-libron, tiu titolita Alatristo, inspirita en la verkaro de Arturo Pérez-Reverte. Kompreneble, ankoraŭ ne estas tradukita la tuta libreto. Kiam ĝi estos finita, ĝi povus esti kroma publikigaĵo en la esperantista mondo, iu alportaĵo de nia esperantista Asocio al la havaĵo de la esperantlingva literaturo, sed, malfeliĉe, tio ne eblos pro tiuj problemoj de intelekta propraĵo, kies solvo postulas specialajn, leĝajn permesojn de aŭtoroj, eldonistoj…




Alia flanko de la agado de nia Asocio estas la subtenado de la interreta blogo de A.E.A. Iompostiom oni aldonadas novajn materialojn: artikoloj, raportoj, tradukaĵoj, recenzoj kaj ĉiuspecaj esperantaĵoj dediĉitaj al la tutmonda publiko kun la propaganda celo montri la utilecon de la Internacia Lingvo.